nia voĉo

madrida esperanto-liceo novembro 2021

## KUNVENI ESPERANTE EN "ESPERANTO"

La unuasabata monata renkontiĝo translokiĝas al tradicia loko: la trinkejoj. Sed ĉifoje ni spertos novaĵon, ni ne nur parolos en Esperanto, sed ankaŭ rendevuos en Esperanto… konkrete en la strato Esperanto de Madrido!

La loko estos la polpejo Pulpería O Miño, en la numero 2, je la suba ekstremo de la strato, apud alia trinkejo koincide nomata Esperanza. Ĝi troviĝas proksime al metrostacio Alsacia, en lineo 2. La tempo estos la sabato 6a de novembro, je la 18,30 horo. Ni atendas la ĉeeston de iuj ekstermadridaj amikoj, kiuj alvenis al nia urbo aŭ anoncis sian ĉeeston.

Krome, ekde la monato novembro oni malfermos la sidejon denove ĉiujn lundojn ekde la 18,30 horo. La aliro estos malferma, kondiĉe ke oni sekvu la necesajn antaŭzorgojn.

## SUKCESO DE LA NOKTO DE LA LIBROJ

Kiel ni anoncis, la 1an de oktobro Madrida Esperanto-Liceo celebris ĉeeste la Nokton de la Libroj, organizitan de la Madrida Komunumo, per antaŭprezentado de la du novaj eldonoj de Hispana Esperanto-Federacio omaĝe al la poeto Federico García Lorca, okaze de la 50a datreveno de la traduko al Esperanto de lia verko "Cigana romancaro". Oni prezentis la reeldonon en bita formo de tiu verko kaj la publikigon de antologio de liaj poemoj, tradukitaj en Esperanton fare de Miguel Fernández, kun titolo "Omaĝe al Lorca".

Unue, la prezidanto de Liceo, Félix Jiménez Lobo, prezentis la agadon kaj la prelegantojn. Sekve, Ana Manero, respondeculo de la projekto, prezentis la omaĝon kaj la du verkojn, kaj klarigis kie ilin atingi: por la bita eldono, vi povas aliri la Bitotekon de HEF ĉe: https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/6429; por la papera libro, indas viziti la Libroservon de HEF aŭ kontakti kun la Liceo.

Poste, Miguel Fernández prezentis sian tradukon, kaj ankaŭ la figuron kaj la verkojn de Lorca, inklude de la tradukoj al Esperanto. Fine, diversaj ĉeestantoj deklamis poemojn de la Romancaro, hispane kaj Esperante. La prezentado estis elsendita virtuale, kaj krome ĝi estis filmita; la rezulto aperos baldaŭ en la reto.





## REKOMENCIĜOS LA INSTRUADO DE ESPERANTO

Iom post iom rekomenciĝas aliaj ĉeestaj aktivadoj. Nia amiko Andy Hernández anoncis sian pretecon denove instrui la lingvon, ĉu ĉeeste ĉu virtuale. La unua celo estas krei ĉeestan grupeton en la sidejo, ĉiam laŭ ebloj de la interesitoj. Ĝi povas komenciĝi en novembro. Do, se vi estas interesita, aŭ konas homojn kiuj deziras lerni la lingvon, kontaktu kun Andy por pliaj detaloj. Oni povas kontakti lin fejsbuke ĉe *@andy.hernandyan* aŭ instagrame ĉe *@andy_vegano*, aŭ vi povas skribi al la retadreso: andyflorida@hotmail.es.

Memoru ankaŭ ke Fuenlabrada Esperantista Ligo anoncis ke ĝi planas komenci ĉeestan kurson ekde januaro 2022, en sia sidejo, en la C.E.P.A. "Paulo Freire", str. Creta, 2, de Fuenlabrada (apud metro-stacio Fuenlabrada-Central). Kontaktu kun Juan del Castillo ĉe la adreso: esperantoesdetodos@gmail.com. Li ankaŭ komencis organizi prezentajn prelegojn tie dum la merkredaj vesperoj.




Alia ebleco estas la instruado oficiala en la Centro pri Lingvoinstruado CUID de la Universitato por Neĉeesta Edukado de Hispanio, UNED, pri kiu ni informis en pasinta numero. Atentu: la periodo de en-skribiĝo estis plilongigita ĝis la 10a de novembro. La klasoj komenciĝas jam ekde la 4a de novembro. Eblas enskribiĝi en du niveloj: la baza kurso (nivelo A2 laŭ la Eŭropa referenckadro por instruado de lingvoj), kaj en la nivelo B1 (post trapaso de nivelekzameno). Por pliaj detaloj vizitu: https://www.cuid.uned.es/.

## SPEKTEBLAS LA HISPANA VIRTUALA KONGRESO

Kiel anoncite, inter la 2a kaj 3a de oktobro 2021 okazis la 79a Hispana Kongreso de Esperanto, organizita de Hispana Esperanto-Federacio kiu ĉijare sukcese okazis virtuale

Se vi ne povis ĝin partopreni, eblas spekti videojn el pluraj programeroj en la jutuba kanalo de HEF https://www.youtube.com/user/esesperanto, aŭ pli konkrete en la spektolisto: https://www.youtube.com/playlist?list=PLX5Zs1YSAzT57wWyO8GeJ_1-p2QWre9cw.

## LASTMOMENTA MALĜOJA NOVAĴO

Ni ĵus eksciis pri la forpaso de nia amiko Maurizio Bartucci, juna italidevena samideano, kiu antaŭ ne tre longe vivis en Madrido kaj estis membro de MEL. Li pace ripozu!

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com